

La rasismo, 2-a parto

Claude Gacond, 90-a radioprelego, 1964.08.19 & 22

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtunda Radiostacio pri la rasismo. Vi aŭdas Claude Gacond.

La pasintan semajnon ni komencis la ekzamenon de grava teksto, kiun skribis en 1962 Martin Luther King junulo, la reverendo, kiu en Usono gvidas la neperfortajn kampanjojn por la ĉesigo de la rasapartigo. Mi hodiaŭ tradukas, kion Martin Luther King diras pri neperforto.

« Oni povus longe paroli pri neperforto, li diras, mi ĝin tamen rapide priskribos. Neperforto taŭgas por malarmigi la kontraŭulon. Ĝi nudigas liajn moralajn limojn. Ĝi malfortigas lian trankvilon kaj samtempe agas sur lian konsciencon, kaj tio tiel bone, ke baldaŭ li ne plu scias, kiel sin teni. Se li vin ne batas, estas mirinde. Se li vin batas, vi disvolvas en vi mem la forton akcepti frapojn sen ilin redoni. Se li vin ne malliberigas, mirinde ! neniu normalulo deziras iri en malliberejon. Se li vin malliberigas, vi tie estas memvole. La malliberejon vi plibonigas, karcero de la honto fariĝas haveno de libereco kaj de homa digno. Eĉ se li provas vin mortigi, vi celos la trankvilan kuraĝon morti sen mortigi. Li absolute ne scias kiel agi kontraŭ neperforto. Neperforto igas la kontraŭulon nekontenta pri si, senarma kaj fine sata de sia propra barbareco. Jen la forto de satjagraho aŭ neperforto.

Sed ĝi ne haltas tie ; ĝi posedas fortajn moralajn kvalitojn, ĉar ĝi permesas al la homo celi moralajn celojn per moralaj rimedoj.

*Ĝi ankaŭ permesas individue apliki la moralon de la amo por la lukto al la libereco kaj justeco. Ĝi permesas al la individuo meti la amon en la centron de sia vivo, kaj tiel ĝi estas socia transformigilo. Jen la beleco de neperforto. Malamo ĉiam malutilas, tiom multe por la subjekto de la malamo, kiel por ĝia objekto. Psikiatroj diras, ke multaj el la internaj konfliktoj de la homo enradikiĝas en la malamo. Pro tio ili asertas : « Amu aŭ pereu » La beleco de neperforto troviĝas en tio, ke eblas batali sen perforto, lukti por kio justas kun amo en la fundo de sia koro. Tiu amo estas nek estetika, nek romantika ; ĝi estas la **AGAPE**, la amo superfluenta, kiu interŝanĝe nenion postulas. Teologoj dirus, ĝi estas la amo de Dio laboranta en la homa koro. Kiam oni altiĝas al tiagrada amo, oni amas ĉian homon, ne ĉar oni havas korinklinon por li, sed ĉar Dio lin amas ; oni amas tiun, kiu faras malbonan agon, malamante tion, kion li faras. Mi kredas, daŭrigas Martin Luther King, ke tio estas, kion Jesuo volis esprimi asertante : « Amu viajn malamikojn » kaj mi estas kontenta, ke li ne diris : « Havu korinklinon por viaj malamikoj », ĉar estas vere malfacile senti korinklinon por iu, kiu ĵetas bombojn kontraŭ vian domon, minacas viajn infanojn, provas vin detrui. Sed Jesuo diris : « Amu ilin » kaj la amo estas pli forta ol la korinklino. Amo estas komprenema kaj kreiga bonvolo, kiu etendiĝas al ĉiuj homoj. Mi firme kredas, aldonas Martin Luther King, ke estas tiu speco de amo, kiu nin kondukos el tiu transira periodo kaj nin permesos realigi veran fratan societon. »*

En Usono la nigruloj nuntempe dividiĝas en du tendencoj. Sub la gvidado de Martin Luther King unuj provas sekvi la malfacilan neperfortan vojon, ĉar ili ne nur celas la venkon super la rasapartigo, sed ankaŭ super sia propra venĝemo. La alia tendenco sekvas la klasikan vojon de la venĝemo. Sub la etikedo Nigraj Muzulmanoj ili fondis batalantan sekton, kiu forĵetas la kristanismon, kiel religion de la blankuloj, kaj instruas la superecon de la nigra raso.

Ĉar ni ne loĝas en Usono, sed en Eŭropo, ni tre bone perceptas, ke la venko de la movado de Martin Luther King signifus por Usono kaj por la mondo grandan moralan progreson, dum la venko de la Nigraj Muzulmanoj kondukus Nordamerikon al senfinaj eterne renaskiĝantaj raskonfliktoj. Ĉar ni ne loĝas en la haŭto de usona blankulo, ni kapablas rigardi la estonton kun iu objektiveco. Imagu nin, ke ni estus naskiĝintaj en la haŭto de usona blankulo. Ĉu ni tiel

La rasismo, 2-a parto
Claude Gacond, 90-a radioprelego, 1964.08.19 & 22

facile perceptus la signifon por nia estonto de la venko de la neperfortemuloj aŭ de la perfortemuloj ? Senkonscie ni timus ambaŭ venkojn, kaj per nia pasiva sintenado ni provus malebligi tiujn venkojn, ne vidante, ke la nigruloj nepre venkos, sed ke malfruiĝo de tiu venko nur povos pligravigi la socian situacion. Tion certe tre bone komprenis prezidinto Kenedy kaj prezidanto Johnson, same kiel la parlamentanoj, kiuj en ambaŭ ĉambroj adoptis la novan leĝon pri la civitanaj rajtoj.

Ĉiu lando konas siajn ras- aŭ klas-konfliktojn. Kiam ili akriĝas, ni devus penadi nin meti en la haŭton de la alia, por kompreni liajn reagojn, kaj se li estas la subpremato, liajn suferojn. Ni ankaŭ devus penadi nin meti en la haŭton de alilandano, por provi vidi per fremdaj okuloj la konfliktojn de nia propra socio. Anstataŭ tion fari, ni tro ofte fermas niajn okulojn kaj obeas al la ĝenerala sintenado de nia ras- aŭ klas-grupo, eĉ se la voĉeto en nia konscienco riproĉas al ni tiun mankon de kuraĝo. Unu tagon bedaŭrinde la voĉeto eksilentos. Tiam ni estos pretaj kun granda morala trankvilo subteni kaj eĉ ĝustigi agadojn, kiujn nia konscienco estus devinta kondamni.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la rasismo.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-